

The
NORTH AMERICAN
ESPERANTO REVIEW



Green Star
over Madison

AUGUST 24, 25, 26, 1956.

NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

Julio - Aŭgusto • 1956

TV:4

The North American Esperanto Review

Published bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., as its official organ. Subscription free to members. Subscription for non-members: \$1.75 per year. Other rates: Bulk orders of 15 or 30 copies of any issue may be ordered, in advance, by members, for 60c and \$1.00 respectively; gift subscriptions for schools, libraries, eminent persons, etc., and for Esperantists living in countries outside of North America, may be purchased by members for 30c per year. (The *Review* reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.)

Addresses: Subscriptions and bulk orders should be sent with payment to the Treasurer. Correspondence regarding circulation, including changes of address, etc., should be sent to the League Secretary. Send literary contributions, news items, announcements, etc. to the Editor: F. R. Carlson, 2116 North 35th St., Seattle 3, Washington.

Deadlines: The *Review* is placed in the mails about the fifteenth of every second month. Material for publication must be in the hands of the Editor no later than the fifteenth of the preceding month, except for last-minute news items, which will be accepted as late as possible.

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., is a non-profit organization to encourage the use of the International Language, Esperanto. *President:* John L. Lewine, 50 Overlook Terrace, New York 33, New York; *Vice-President:* James D. Sayers, RFD 2, Lillie, La.; *Secretary:* Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa.; *Treasurer:* Edward W. Pharo, Jr., 220 County Line Rd., Somerton 16, Pennsylvania.

Membership Dues: Regular Members, \$3.; Supporting Member, \$5.; Patron, \$10; Life Member, \$50; Man and wife, each having privileges of Regular Member, but receiving only one copy of publications, etc., \$4.00.

Members are asked to take careful note of the paragraph above entitled "Addresses" and to address all communications accordingly.

Make all checks and money orders payable to "Esperanto League for North America, Inc."

The North American Esperanto Review

(*Nordamerika Esperanto-Revuo*)

Vol. 4, No. 4.

July-August, 1956.

The Review not only permits, but invites, reprinting of material from its pages, except where special notice, such as notice of copyright, appears.

La Revuo ne nur permesas, sed invitas, represon, escepte kie aperas speciala noto limiga pri kopiado.

CONTENTS (English)

Let's Go!	Page 1
Practical Uses of Esperanto	2
What's Your Line?	4
Humanist Resolution on Esperanto	6
Suggestions to Beginners	7
Addresses	11
Complete Grammar and Pronunciation of Esperanto	Inside Back Cover
ENHAVO (Esperanta)	
Madison, Wisconsin	3
Novaj Gazetoj	5
Kiel Instrui Esperanton	8
Azorian Apelasoj	10
Vaganta Instruistino	11
Bonvolu Skribi (Korespondpetoj)	11, 12
Esperanto en Norda Ameriko	13
Konu Viajn Gesamideanojn	14
Novaj Libroj	15
Por Rimistoj	16

This issue of the *Review* deals largely with Esperanto periodicals. Much of the material used here has been gleaned from Esperanto magazines from all over the world. The article "What's Your Line?" gives a general idea of the wide range of interests served. However, the list is very incomplete. Since printing of that article, I have received the first issue of *Geografia Revuo*, a most interesting newcomer. *Editor.*

The NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 4

July-August, 1956

No. 4



Let's Go!

- WHERE? To the new building of the University YMCA, in Madison, Wisconsin.
WHEN? August 24, 25, and 26.
HOW? By train or bus, or plane or thumb.
WHO? All the Esperantists, and you're invited, too.
WHY? For the annual Congress of the Esperanto League for North America.

LET'S GET THERE EARLY for the big get-acquainted meeting, August 23rd.

AND LET'S WRITE and tell the Committee we're coming so they'll put on extra plates at the supper, and have room for us on the boat ride.

THE LOCAL CONGRESS COMMITTEE CHAIRMAN IS:

Glenn Turner, Route 1, Middleton, Wisconsin. Let's write and tell him we're coming to

have fun.

Practical Uses of Esperanto

WASHINGTON TO WARSAW

An employee of one of our government agencies, planning a trip to Europe, called the Washington (D.C.) Esperanto Club, to get instruction in Esperanto before she started the trip. She was particularly concerned about the language problem in some Eastern European countries which she planned to visit.

The Club had no class and there was not time enough to organize one for her. So she undertook to learn the international language by herself. The local Esperanto club wrote to the Esperanto Delegates in cities she planned to visit, asking them to help her. However, the Club officials now admit that they underestimated the ability of a determined person to learn Esperanto in a few weeks. They did not think that she would learn enough to be of real use.

The club recently received a letter from the Delegate in Warsaw, Poland, saying that their "thirty day wonder" spoke only Esperanto during her entire stay there, and that she addressed a meeting of 200 people in Esperanto. Her talk was translated into Polish and, according to the Polish informant, made a great impression on the audience — "the more so because an English-speaking woman used Esperanto and because a representative of a so-called 'imperialist' state spoke of peace and friendship among nations."

Thanks to the Bulletin of the Washington Esperanto Club

HELP TO JOB-HUNTERS

An auto factory in Sweden is offering a practical training course of two months or more in its plant, for properly qualified technical school students *who are Esper-*

antists. Some pay while learning, and a chance of a steady job in the factory afterward. The local Esperanto group will help in facilitating arrangements for the stay in Sweden.

The *Review* is presenting this *only* as a news item. The training course was scheduled for August and September. However, if any of our readers want to look into the chance of a "repeat" on this opportunity (we don't know!), write *in Esperanto*, of course, to *Svedujo 956, Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Netherlands.*

SEX REARS ITS COMB

A rather unusual profession is that of a Japanese group of specialists — distinguish the sex of baby chicks. With chicks only 24 hours old, these experts can tell the sex with 98% accuracy. They have an organization (with agents abroad) which arranges for them to travel to wherever their services are required.

For many years, chicken breeders in Sweden have utilized the services of these Japanese specialists on a seasonal-work basis. This year, Mr. Carl-Erik Carlsson, a chicken breeder in St. Levene, required that the expert sent him must be an Esperantist. But there were no Esperantists in the group!

Mr. Etsushi Kyuhara is an enterprising young man. He took the job, and started to learn Esperanto — three months before his arrival in Sweden. Now Mr. Kyuhara says that understanding and being understood is easier in Esperanto (3 months to learn it!) than in English, which he has studied for 3 years.

Dankon al Heroldo de Esperanto



Madison, Wisconsin

En la urbo Madisono
Dum Aŭgusto estos trono
De la tutnordamerika
Esperantistar' amika.
Apud universitato
Estas halo kie frato
Fraton ĝoje reenkontos,
Kaj ĉe ĉiu freŝrefontos
Al la lingvo Esperanto
La sinteno de amanto.
"La Espero" dolĉe sonos
Kaj al ĉiuj ree donos
Senton de solidareco
Kaj de samideaneco
Kun la tuta mondpopolo.

Renaskiĝos forta volo
Ke popoloj de la mondo
Estu ĝoja frata rondo.
Venu! Kaj por Esperanto
Ĵuru esti laboranto
Ĝis bariloj inter homoj
Forbloviĝos, kiel domoj
El kartono antaŭ vento,
Pro la homarana sento
Kaj la konkeranta ondo
De pacamo en la mondo.
Venu do, nordamerika
Esperantistar' amika,
Al la urbo Madisono,
Dum aŭgusto *via* trono.

(*La verkinto: ferdkarlsono*)

ELNA-Kongreso, University YMCA Bldg., Madison, 24-26 Aŭgusto.
Interkonatiĝa vespero samloke, la 23an. LKK: Glenn Turner, Middleton, Wisconsin.

WHAT'S YOUR LINE?

WHATEVER your line of interest . . . ideology, occupation, hobby . . . the Esperantists probably have an organization and/or a publication to interest you.

Most Esperanto publications are organs of national, regional, or local groups, from the review *Esperanto*, of Universala Esperanto-Asocio, to semi-occasional mimeographed or typed bulletins of local groups. These, of course, cater to no special interest, but deal with the Esperanto movement itself.

But . . . if your interest is in:

RELIGION:

You will probably be interested in one or more of these:

La Kruco, of the North American Catholic Esperantists; *Dia Regno*, of Kristana Esperantista Ligo Internacia (advertised in the Review); *Vojo-Vero-Vivo*, of Internacia Katolika Informejo; *Espero Katolika*, of Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista; the bulletins of Spiritoscienco Instituto de Martinus; *Oomoto*, of Universala Homama Asocio; etc.

POLITICS, LABOR AFFAIRS:

La Praktiko, of Universala Ligo; *Sennaciulo* and *Sennacieca Revuo*, of Sennacieca Asocio Tutmonda; *La Progresanto*, of Federacio de Laboristaj Esperantistoj in the Netherlands; *La Semanto*, of Svisaj Laboristaj Esperantistoj; etc.

VEGETARIANISM:

Vegetarano, of Tutmonda Esperanto-Vegetara Asocio.

STAMP COLLECTING:

La Filatelisto.

BELLES LETTRES:

Norda Prismo; *Nica Literatura Revuo*; also *Sennacieca Revuo* (mentioned above).

TOURISM:

La Migranto; *Informilo* of Turista Asocio de Naturamikoj, Esperanto-Fako; *Kontaktito*, of Turisma Sekcio de Slovenia Esperanto-Ligo; etc., plus many tourist brochures issued in various localities.

PROFESSIONAL AFFAIRS:

Medicina Revuo, of Tutmonda Esperan-

tista Kuracista Asocio; *Informilo* of Internacia Grafika Esperanto-Ligo; *Bulteno* of Internacia Federacio Esperantista Fervojista; etc.

BOY OR GIRL SCOUTS:

Skolta Mondo, of Skolta Esperantista Ligo.

YOUTH:

Juna Vivo, of Tutmonda Esperanto-Junular-Organizo; *Bulteno Gepatra*; *Nia Voĉeto*, of SAT-Amikara Rondeto; etc.

SCIENCE:

Scienca Revuo, of Internacia Scienca Asocio Esperantista; *Bulteno* of Internacia Geografia Asocio; etc.

The list given here is, of course, incomplete. Probably some publications and organizations could be added to any of the sections. And the number is constantly growing, as more and more people discover the value of Esperanto for contacts with persons throughout the world who have some interest in common.

History of International Language

The need for an international language is not new. It is merely getting more and more desperately urgent.

C. W. Ceram, in "The Secret of the Hittites", published by Knopf, states that in the Empire of the Hittites (Near East, 13th Century B.C.) eight languages were spoken. So for international documents and agreements they borrowed the Babylonian cuneiform writing.

ON TO MADISON!

NOVAJ GAZETOJ

Nian movadon riĉigis pluraj novaj gazetoj en la lasta tempo. La plej nova, kiu meritas subtenon de Esperantistoj ĉie, estas: *Geografia Revuo*, Majo, 1956. Bone presita kun granda nombro da bildoj, ĝia unua numero enhavas i. a. artikolojn pri Amazona esplorvojaĝo, Admiralo Byrd ĉe la Suda Poluso, la Internacia Geofizika Jaro kaj multaj ĝeneralaj informoj, ĉiuj ege interesaj. Ĉi tiu numero enhavas 36 paĝojn, sed estontaj havos (laŭ la redaktoro) 52. Abono por unu jaro: \$1, pagebla ĉe UEA. Ni nepre subtenu ĉi tiun gravan eldonon de la Internacia Geografa Asocio.

Novaj (de antaŭ unu jaro) literaturaj gazetoj estas *La Nica Literatura Revuo* kaj *Norda Prismo*. La unua, redaktata de G. Waringhien, estas hodiaŭ nia plej bona literatura gazeto: ĝi prezentas prozaĵojn, poezion, recenzojn laŭ la maniero de la iama *Literatura Mondo*.

Iuj legantoj tamen pli estimas *Nordan Prismon* pro ĝiaj tre bonaj papero kaj preso, ilustraĵoj, pli puraj lingvo kaj stilo. Ĝi estas principe nordlanda gazeto, en kiu oni trovas pli da tradukita materialo el la nordeŭropaj lingvoj. *Nica* enhavas 44 paĝojn, *Prismo* 52; sed *Prismo* havas preskaŭ duoble tiom da materialo po paĝo. Ambaŭ aperas dumonate, estas aboneblaj ĉe la Ĉefdelegito de UEA. DBR

Antikva saĝo tre valoras
Se problemon vi esploras.
"Ezopa Saĝo" gravas do
Pli ol rakonto pri hero'.
Kalocsay rimtradukis ĝin;
La prez': nederlandguldenoj kvin;
La eldonisto: fama Kok';
Jen pli konvena mendolok':

Esperanto League Book Service
Middleton, Wis.

ANONCOJ

Tarifo: \$1 ĝis sep linioj. Dek procenta rabato por du- aŭ plifojna apero. Petu informon pri tarifo por pli grandaj aŭ multfoje aperantaj anoncoj aŭ reklamoj.

ESPERANTISTAJ LIBERPENSULOJ!

Petu la septembran numeron de

The AMERICAN RATIONALIST

kiel provnumeron. La enhavo inkluzivas Esperantlingvan artikoleton kaj artikolon pri Esperanto.

Oni korespondas Esperante.

2218 St. Louis Ave.
St. Louis 6, Mo.

L E A R N ESPERANTO

VIA AŬTOMOBILo Reklamas Esperanton

kiam ĝi portas reklamstrion (bumper strip) ĉi tian. Fluoreska verda koloro "lumas" en la mal-lumo. Mendu po 20c, 6 por \$1 aŭ 12 por \$2. Esperanto-Societo de San Diego, Box 4367, San Diego 4, Calif.

PARDONU!

La adreso de Attitude Research Laboratory, mispresita en la junia *Revuo*, estas: 946 Goodfellow Blvd., St. Louis 12, Mo.

Portu la Verdian Stelon

Humanist Resolution on Esperanto

The American Humanist Association adopted the following resolution at its Annual Meeting in Chicago last March, as reported in the March, 1956, issue of its bulletin, *Free Mind*.

A WORLD LANGUAGE

Whereas, having received an international petition favoring Esperanto as a common auxiliary language to link the peoples of the world more closely, UNESCO, meeting in general Conference in Uruguay on December 10, 1954, recognized the results obtained by Esperanto in the field of international relations and rapprochement of the peoples of the world, and authorized the Director-General of UNESCO to follow current developments in the use of Esperanto and to cooperate with the international Esperanto association; and

Whereas, the World Humanist movement needs a common language so that Humanists may discuss their problems more adequately,

Be it resolved, That the American Humanist Association endorses the action of UNESCO;

And be it further resolved that the American Humanist Association recommends to its members the study of the problem of communication among the peoples of the world and the various solutions that have been suggested.

What is the significance of the AHA resolution? It is probably the first instance in which an important cultural movement in the United States has officially recognized its need of a world language. We may expect others to follow.

This endorsement will strengthen the conviction of UNESCO in the rightness of its action at Montevideo. As other endorsements follow, UNESCO will be encouraged and impelled to move further along the path leading to the establishment of a world language.

The final paragraph of the resolution reflects the caution of many persons who are simply not informed as to the history of the world language movement during the past sixty or seventy years. They have heard names like Volapuk, Ido, Occidental, Novial, Interlingua, to mention a few, and have acquired the impression that there are many strong rivals competing for recognition as the international lang-

uage. Even a casual study will reveal that this impression is a mistaken one. The unbiased student of the problem soon discovers that only Esperanto has taken root and actually become a living language in every sense of the term. The product of Zamenhof's genius, the Esperanto of 1887, was a seedling which grew into a sapling strong enough to weather the storms and adverse climate of world wars and iron curtains, although some grandiose projects like the League of Nations succumbed.

The Esperanto tree is firmly rooted now and thriving, in spite of the long indifference of most of the influential organizations in the fields of culture and science, which could have helped so much in the times of struggle. If they will wake up at last and cultivate the tree, it can soon bring forth a rich harvest for the whole world. Surely the time is past when any informed person could be hesitant about coming all out for Esperanto! *G. Falgier*

SUGGESTIONS TO BEGINNERS

ELSEWHERE in this issue are a couple of pages of suggestions for teachers of Esperanto. So let's be fair and give the students a few ideas, too.

I. One very good idea is to cut a few slips of paper or cardboard and on each one write on one side an Esperanto word and on the other side the English equivalent. Carry them in your pocket. Whenever you have a chance, take one out, look at either the English or the Esperanto side, and try to remember what is on the other side. Do the same with affixes and grammatical endings.

II. Try to put into Esperanto the vagrant thoughts which float through your mind. This exercise leads directly to the final goal of your study, thinking in Esperanto.

III. Remember that an Esperanto root represents an idea, not just an English word. "Bear" (carry) is *port-*, but Bruin is not *porto*.

IV. Numbers bother you? *Unit, duet, trio, quartet, quintet, sestet, septet, octave, non(naŭ)agon, Decalogue.*

Double, triple, etc. Esperanto uses the *bl* for all multiples.

Ordinal numbers (first, second, etc.) are simply numbers used as adjectives. Add

the *a* ending (*unua, dua, etc.*)

A good example for III (above) is the confusion in English between ordinals and fractions. "Fourth" may mean "following the third", or it may mean "one of four equal parts". In Esperanto, the *a* ending is always used for ordinals, the suffix *on* for fractions.

V. *Know your Edinburgh!* (If you don't use an Edinburgh, you're working too hard.) Read the introductory pages carefully. Browse in it occasionally. Where the Edinburgh gives several translations for one English word, think of the various meanings of the English word, and pick the translation which fits. If none of them fit, think out *what the English sentence really means*, and translate accordingly. Don't blame the Edinburgh, blame English. Even my Webster's New International Dictionary (2620 pages) doesn't have enough definitions to explain this one:

"When I was *over* in the warehouse, I talked *over* the telephone for *over* ten minutes to the man *over* the river, to sell him the stock that was left *over*."

HOW CAN I LEARN ESPERANTO?

For private study order one of these texts:

The Esperanto Teacher.....	\$.45
Nelson's Esperanto Course.....	1.50
Step by Step in Esperanto.....	1.50

or

Order the Esperanto Teacher, above, and enroll in our free correspondence course: Esperanto by Mail, 123 East 35th St., Brooklyn 3, N.Y.

KIEL INSTRUI ESPERANTON

Konsiloj al Kursgvidantoj

de At. D. Atanasov-Ada

1. La instruanto devas mem tralegi antaŭe ĉiun instruotan lecionon.

2. Oni devas celi *ne kvantan, sed kvalitan* lernon. Prefere estas eĉ ne ellerni la tutan materialon de la uzata lernolibro, sed doni *solidajn konojn*, ol pasigi rapide kaj supraĵe la tuton ĝis la fino. La lernaĵo de ĉiu leciono devas esti bone komprenata, asimilata kaj memorata de la lernantoj. Se en la kurso ili akiras solidajn kaj daŭrajn konojn pri la pli granda parto de la materialo (gramatiko kaj afiksoj), ili mem poste povos solaj ellerni facile la nelernitan reston.

3. La instruanto ĉiam konsideru la signifon de la *tipa frazo* ĉe la instruado. Pri ĉiu regulo la lernantoj ekmemoru konvenan modelan (tipan) frazon, laŭ kiu ili formos plu aliajn esprimojn, uzante diversajn vortojn kaj aplikante la lernitan regulon. (Plej impresaj kaj facile memoreblaj estas la proverboj pro siaj senco, rimeco kaj ritmeco.) La reguleco de Esperanto ebligas uzi plej larĝe la analogion.

4. Laŭ la didaktika praktiko dum jarcento, normala leciono konsistas el la sekvantaj stadioj (ŝtupoj):

a. En la komenco de la leciono: kontrolo de la konoj de la lernantoj pri la materialo lernita en la antaŭa leciono. Tion la instruanto povas fari ĉu per kelkaj demandoj, donataj al la lernantoj, ĉu igante iun lernanton skribi sur la nigran tabulon la ekzercojn donitajn por hejma laboro (kiuj devas respuguligi la lernitajn en la pasinta leciono regulojn).

b. Lego de la teksto (legaĵo) de la nova leciono; analizo kaj klarigo de la gramatikaj reguloj kaj de la afiksoj, renkontataj unuafoje en tiu teksto. En la unuaj lecio-

noj la instruanto mem legu la tekstojn; li devas legi laŭte, malrapide, kun plej klara prononco.

c. Prilaboro de la ekzercoj donitaj en la lernolibro ĉe la respektiva leciono. La prilaboro povas fariĝi unue buŝe (parole) post tio skribe sur la nigran tabulon. (Tiamaniere la reguloj estas ripetataj kaj la nove lernita materialo firmigata.)

ĉ. Dono de tasko por hejmlaboro (ordinare la ekzercoj jam prilaboritaj en la klaso).


5. Post kiam la instruanto legis la tekston, la saman tekston devas legi alterne kelkaj kursanoj. Se iu vorto aŭ frazo estas legata nekorekte, tuj post ĝia finlego la instruanto mem elparolas ĝin kaj instigas la leginton ripeti ĝin korekte. Neniam lasu nekorektita neregule elparolitan vorton aŭ frazon.

6. Ne forgesu la fundamentan didaktikan regulon: iri de la konata al la nekonata, de la proksima al la malproksima, de la konkreta al la abstrakta.

7. Kion vi povas montri en naturo, ne donu ĝian nomon nacilingve. Preferu klarigi la signifon de vorto perifraze en Esperanto ol traduki ĝin nacilingve; la nacilingva traduko de vortoj kaj esprimoj povas veni en la fino de la klarigo, kiel rekapitulacio.

8. Preferu ĉiam klarigi per ekzemploj ol teorie. Evitu elkatedran teorian instruadon kaj klarigon de la gramatikaj reguloj kaj de la afiksoj. Preferu doni plurajn ekzemplojn, el kiuj la lernantoj komprenos la regulon. (En la fino oni povas formuli la regulon mem, sed tio ne estas la plej esenca lerno kaj ne estas nepre necesa.)

9. Penu paroligi la lernantojn, donante

 EN LA APRILA NUMERO, mi petis ke spertaj instruistoj verku konsilojn por pliefikigi la laborojn de la nespertaj. Sed jen en la Bulteno de la Bulgara Esperantista Asocio, precize tio, kion mi petis. Mi dankas. *F.R. Carlson, Red.*

al ili demandojn. La instruanto devas gvidi la konversacion per konvenaj demandoj kaj per ĝeneraligaj konkludoj, sed li devas eviti paroli pli multe ol la lernantoj. Postulu ĉiam plenajn respondojn (ne mallongajn: nur per jes aŭ ne).

10. Por rompi la ĝenecon de la lernantoj en la komenco de la instruado, igu ilin *ripeti ĥore* la lernatajn vortojn (precipe la pli malfacilajn) kaj esprimojn, aŭ *respondi ĥore* al la donataj demandoj. La instruanto povas ankaŭ instigi ĉiun kursanon doni demandon al sia benknajbaro (pri lia nomo, aĝo, profesio, adreso, ktp.)

11. La *ĥora elparolo aŭ respondado* devas esti praktikata nur en la komencaj lecionoj; ili ne devas resti kiel praktiko konstanta (ĉar ili povas difekti la disciplinon en la klaso). En la pluaj lecionoj la instruanto direktas la demandojn al la tuta klaso sed ne permesas ke ĉiuj respondu kune aŭ senorde. Post kiam li donis la demandon, li lasas nelongan paŭzon por ebligi al la lernantoj pripensi la respondon kaj tiam li direktas la saman demandon individue al iu el la lernantoj, ne permesante, ke alia lernanto respondu nedemandite. Se la demandito ne povas doni ĝustan aŭ korektan respondon, la instruanto direktu la saman demandon al alia lernanto. Se neniu el la lernantoj povas doni kontentige korektan respondon al proponita demando, tio ĉi montras, ke la koresponda materialo ne estas sufiĉe komprenita kaj asimilita de la klaso. En tia okazo la instruanto devas denove klarigi la saman materialon.

12. Evitu doni demandojn ĉiam nur al bonaj lernantoj. Preferu demandi pli ofte ĝuste tiujn, kiuj lernas kaj komprenas malpli facile.

13. Skribu sur la nigran tabulon ĉiun novan vorton.

14. Sugestu al la lernantoj la praktikan manieron pri lerno de vortoj, skribante sur apartajn malgrandajn folietojn aŭ kartonetojn la apartajn vortojn kaj sur la dorsojn de la samaj folietoj aŭ kartonetoj la nacilingvan signifon de la respektiva vorto; en ĉiu libera minuto la lernanto elprenu el la poŝo iun el tiuj skribaĵoj kaj legu ĉu la esperantan, ĉu la nacilingvan vorton, penante memori ĝian signifon aŭ tradukon.

15. Igu la lernantojn ellerni parkere poeziaĵojn aŭ apartajn legaĵojn kaj nepre ĉiujn legitajn proverbojn.

16. Instruu laŭeble al la klaso esperantajn kantojn.

La supredonitaj reguloj havas nur konsilan kaj gvidan karakteron. Oni ne devas sekvi ilin blinde kaj mekanike, sen konsidero al la konkretaj kondiĉoj de la instruado.

Ĉiu instruanto en la daŭro de sia praktiko ellaboras al si propran metodon, konforman al la konkretaj laborkondiĉoj (intelekta stato de la plimulto de la lernantoj, lia persona temperamento, ktp.), utiligante la elementojn de la diversaj instruometodoj kaj konsiderante la didaktikajn principojn — frukto de longa pasinta eksperimentado.

(Tiuj notoj estas eltiritaj el la enkonduka parto de la nove relaborita deka eldono de "Kurso de Esperanto por Bulgaroj" de Ada, ankoraŭ ne presita.)

PORTU LA VERDAN STELON

Azorin Apelacias

En la junia numero de la *Revuo* aperis decido de la Akademio pri *Ilustrita Vortaro de Esperanto*. La *Revuo* ne deziras starigi argumentadon pri la afero. Por tio ja fondiĝis la Akademio. Sed kiel simpla ago de justeco al S-ano Azorin, la *Revuo* nun prezentas lian apelacion.

APELACIO DE LA AŬTORO AL DEKLARO DE LA AKADEMIO PRI "ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO"

S-ro. Prezidanto de la Akademio:

Vian decidon ne unuaniman, en juĝo sen aŭdi min, mi tutrespekte apelacias, per sekvantaj rezonoj:

Punkto 1: Ke mi "arbitre enkondukis formojn novajn kaj senprecedencajn por anstataŭigi radikojn de la Fundamento kaj Oficialaj".

Sed Zamenhof diris en la Antaŭparolo al la Fundamento: "riĉigadi la lingvon per novaj vortoj oni povas". Kaj en "La Revuo I, 1906" ripetas "oni povas enkonduki plibonigojn per vojo de neologismo kaj arĥaismoj". Tiel mi enkondukis rezone — arbitre, senprecedence nur celasofendi — formojn novajn, laŭ mi plibonigojn, kiel studmaterialo. Por altrudi anstataŭigon mi ne havas aŭtoritaton kiel mia konkurenca rivalo, la denunciinto, kiu enkondukis dekojn da duoblaĵoj, kiel mi detalis alie.

2. Ke mi "donis al kelkaj fundamentaj radikoj novajn kaj konfuzajn neniaj aprobitajn signifojn". Sed la Akademio devus scii ke neniaj aprobiĝis signifoj de la fundamentaj radikoj; ni baziĝas sur la kvinlingvaj tradukoj de la radikoj en la Radikaro; do, ĉiu difino estas nova, kaj se konfuza, tio povas dependi de la leganto. Krome, subskribas tion, kiu plenigis vortaron per pli ol 400 kontraŭfundamentaĵoj, kiujn mi detalis alie.

3. ke mi "distranĉis fundamentajn aŭ oficialajn radikojn en radikerojn kaj afiksojn, kiujn mi elforgis aŭ provizis per ĝis nun ne konataj sencoj". Sed Zamenhof "distranĉis" en la Radikaro la fundamentajn radikojn Am'ind'um', Duon'patr', Mol'anas', Tri'foli' . . . kaj Pro'cent', kiun la Plena Vortaro integris, t. e. ŝanĝis senrajte. Mi, laŭ la majstra skolo, distranĉis, ekz., Kilo'gram', laŭ du radikoj Kilo-Gramo, ambaŭ troviĝataj en PV kun S. Kaj similrezone aliajn.

Por esti konciza mi ne prezentas pli da ekzemploj, sed tio sufiĉas por inklini vin, mi kredas, revizii vian Deklaron, kaj aŭdi min, aŭ pruvi ke mi eraras.

Francisko Azorin

ANONCOJ

Tarifo: \$1 ĝis sep linioj. Dek procenta rabato por du- aŭ plifojaj aperoj. Petu informon pri tarifo por pli grandaj aŭ multfoje aperantaj anoncoj aŭ reklamoj.

Kristana Esperantista Ligo Internacia estas interdenominacia asocio de protestantaj esperantistoj. Ĝia gazeto *Dia Regno* aperas monate, eldonate en Nederlando. Ni invitas ĉiun esperantiston konsideri abonon al la gazeto, aŭ membrecon en la ligo. Petu informojn kaj provekzempleron de la usona peranto, Donald R. Broadribb, 310 So. 13th East, Salt Lake City 2, Utah. Kotizoj (abono: \$1.40, membreco: \$1.60) estas pageblaj al la peranto aŭ al la libro-servo.

POR MALGRANDAJ PAGOJ AL Esperantistoj kaj Esperanto-eldonejoj en aliaj landoj, uzu la "stelojn" de Universala Ligo. Kosto, po 7¢; plenvaloraj ĉie en Esperantujo. Mendu ĉe: D. E. Parrish, 328 West 46th St., Los Angeles 37, Calif.

PORTU LA VERDAN STELON

KOREKTO

La *Revuo*, antaŭ iom da tempo, raportis ke S-ro Molotov uzis Esperanton en telegramo oficiala al japana grupo. Ni tion faris baze de raporto diskonigita de gravaj informagentejoj kaj radioretoj. Tamen, la *Revuo* kaj la aliaj gravaj gazetoj tromp-igis.

Omoto raportas ke la telegramo estis en la angla kaj rusa lingvoj. Iu oficisto, vidante ĝin, ŝajne kredis ke lingvo uzata por internacia korespondado, kaj kiun li ne konas, nepre devas esti la internacia lingvo, Esperanto.

Tute racie! Ni tre bedaŭras, ke la ŝtatisoj estas iom malpli saĝaj ol li kredis.

VAGANTA INSTRUISTINO

F-ino Sybil Lock, el Bristol, Anglujo, interŝanĝa instruistino en Columbia, S.C., dum la pasinta lerneja jaro, faras grandan turvojaĝon en Norda Ameriko. Ŝi vizitis Esperanto-grupojn en Mexico, D.F., San Diego kaj Los Angeles, California, Seattle, Wash., kaj aliaj lokoj. En Seattle ŝi diris ke ŝi esperas renkonti pluajn gesamideanojn en Vancouver, Banff, Toronto, Hamilton kaj Montreal, kaj alvenos en Bristol nur du tagojn antaŭ komenco de la lerneja laboro.

En San Diego ŝi helpis prezidi la Esperanto-budon ĉe la foiro dum tri tagoj.

En Los Angeles ŝi veturis per fiakro. La fiakristo, lerninte ke ŝi venis el Anglujo, menciis ke alia anglino veturis kun li antaŭ ok jaroj, "kaj ŝi parolis Esperanton." Post iom da diskutado, F-ino Lock eltrovis ke tiu alia anglino fakte estis ŝia iama Esperanto-instruistino, Stella Toogood!

Por informoj pri

Esperanto en Nordameriko

Skribu al



Grava Anonco

La Estraro de UEA ĵus decidis, ke la Universala Kongreso en 1957 okazos en Marseille de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto, 1957. La Estraro ekzamenis plurajn aliajn invitojn, sed trovis ke en la nuna momento, pro diversaj kaŭzoj, la plej taŭga loko por la 42-a U.K. estas Marseille.

Bonvolu Skribi

Esperanta societo Ljubljana, Mikloŝiĉeva 7, Jugoslavio, aranĝos dum decembro okaze de 35-jara jubileo de la societo, letervesperon. Ĝi eldonos ankaŭ broŝuron, kiu priskribos historion de la E-movado en Slovenio ĝenerale kaj aparte en Ljubljana. Ĉiu, kiu skribos al la societo okaze de la letervespero, ricevos rekompence la menciitan broŝuron. En la dua duono de septembro ni aranĝos grandskalan ekspozicion kaj ni petas ekspozicimaterialon.

NOTINDAJ ADRESOJ

Esperanto-Klubo de Los Angeles:
1237 N. Alexandria Ave., Los Angeles 29,

Washington (D.C.) Esperanto Club:
2829 Gainesville St., S.E., Wash. 20, D.C.

Esperanto Association of New Jersey:
448 So. Orange Ave., Newark 3, N.J.

Esperanto-Societo de San Diego:
P.O. Box 4367, San Diego 4, California.

Seattle Esperanto Society:
3231 West 62nd St., Seattle 7, Wash.

George E. Wagner, 403 E. North St.,
Tampa 4, Florida,

H. K. Ver Ploeg, 1908 East 8th Avenue,
Spokane 32, Wash.

Esperanto League for North America,
Route 1, Meadville, Pennsylvania.

Salutas la Ligojn

S-ro Paul Balkanyi, Budapest 54,
M. Nemzeti Bank, Hungario, kaj "Paco"
Esperanto-Rondo en Budapest

KAJ

Asocio de Esperantistoj en Pollando.

KAJ

Johan Essi, Tallinn, Paskula Kirsistr. 27,
Estonia S. S.R.

Bonvolu Skribi

La *Revuo* presas senpage (sed eble mal-longigas) korespondpetojn el aliaj landoj. Ili aperas nur se, kaj kiam, konvenas al la redakcio. Por certigi nepran aperon, oni pagu la kutiman anoneprezon (\$1 ĝis 7 linioj). Se resendadreso ne estas legebla, la peto estas nek presebla, nek presinda, do ne presota. SKRIBU KLARE!

Tojota Ozeki, Koohuen, Aterazaŭa-maĉi, Jamagata-ken, Japanujo. Brajltraduka servanto, 34-jara, pulmomalsanulo, komencanto en Esperanto. Pri blindula problememo.

S-ro Masaki Imai, Hukuoka Syogyo Koto Gahko (Hukuoka Komerca Altlernejo) Katahasu, Hukuoka-si, Japanujo. Instruisto (50-jara), 3 lernantoj (15-, 16-, kaj 17-jaraj) kaj 5 lernantinoj (16-jaraj) kun samaĝul(in)oj, per leteroj kaj poŝtkartoj. Komencantoj (escepte la instruiston).

S-ro Hideo Ootaka, ĉe S-ro Kenzaburo Fukano, 27-2 Toyotama-Kami, Nerima-Ku, Tokyo, Japanujo. Per bildkartoj. 25-jara, laboristo, komencanto.

KANADANOJ ATENTU!

La Centro por Kanadaj Esperantistoj, Box 52, Terminal A, Toronto, petas ke ĉiuj, kiuj volas partopreni organizitan leterkriban kampanjon, sciigu al la Centro. Leteroj al redaktoroj estas tre efikaj por propagandi. Oni jam ricevis tre bonajn rezultojn el leteroj aperintaj en diversaj kanadaj gazetoj. Vigla kampanjo nun povas starigi fortan Esperanto-movadon en Kanado.

SKRIBU NUN!

PORTU LA VERDAN STELON

HEROLDO

DE ESPERANTO

DUONMONATA INTERNACIA
ORGANO DE LA ESPERANTO-
MOVADO

Prezoj:

Abono tutjara	\$4.00
Abono julio-decembro	2.00
Abono subtenanta	8.00
Anonceto po 25 vortoj50

Nordamerika peranto:

Donald E. Parrish
328 West 46th Street
Los Angeles 37, Calif.

la Praktiko!

LA GAZETO DE LA MONDPOPOLO

Monata internacia ilustrita revuo

Prezoj:

Jarabono (nur por kalendara jaro) kun membreco en Universala Ligo:	\$2.00
Anonceto po 25 vortoj:	.50

Nordamerika peranto:

Donald E. Parrish
328 West 46th Street
Los Angeles 37, Calif.

ESPERANTO EN NORDA AMERIKO



BUKEDEGO POR SAN DIEGO

La entreprenemaj gesamideanoj en San Diego havis budon por ekspozicii Esperantaĵojn ĉe la granda foiro en tiu urbo. Pli ol 100,000 homoj preterpasis la budon. Pli ol 350 registris siajn nomojn por ricevi pluajn informojn. Oni disdonis entute pli ol 5000 informilojn.

La Esperanto-klaso ĉe la San Diego Altlernejo finiĝis, kaj 20 gelnantoj partoprenis la finan ekzamenon. 15 el ili ricevis diplomojn por unuagrada kompetenteco en la lingvo. La sukcesintoj: S-ro Francis E. Helmuth, S-ino Bonnie Helmuth, S-ro Marion Sharp, S-ino Vlasta Sharp, S-ro Arthur Todd, S-ro Wm. Dale Brown, S-ro John D. O'Brien, S-ino Charlotte Austin, F-ino Lila Sinclair, F-ino Dee Lawson, S-ino Marie-Louise Shaw, S-ino Lillian Kenworthy, S-ino Alice Buchholtz, S-ino Ruby Cotter, S-ro Norbert T. Cormier.

SACRAMENTO, CALIF.

La Sacramento Esperanto Club fermis la printempan sezonon per potsanca vespermanĝo, la 21an de junio, ĉe Ges-roj J. E. Carpenter. Por malfermi la aŭtunajn laborojn, ili veturis al la bela arbara hejmo de Ges-roj Zetterlund por pikniko, je la 12a de aŭgusto. Dum la junia kunsido, la prezidantino, Ida Belle Craig, elmontris lumbildojn de sia vojaĝo tra Eŭropo.

RIVER PINES, CALIF.

Ges-roj Dittlof kaj Elvira Zetterlund, kiuj gastigis la fondiĝon de ELNA, petas saluti ĉiujn Liganojn. Ili intencis ĉeesti la Kongreson en Madison sed, pro kormalsano ĉe Dittlof, kredeble ne povos fari la longan veturon.

MIAMI, FLORIDA

Post longe malsukcesa klopodado, S-ano George E. Wagner sukcesis starigi vigan klason en Miami. (Jen bona ekzemplo por tiuj, kiuj tro facile malesperas. S-ano Wagner, la instruanto, estas eksestrarano de ELNA.)

PORTLAND, OREGON

The Oregon Journal prezentis leteron de UEA-delegito Cecelia Thomas, en kiu ŝi proponas tradukservon por iu ajn, kiu ricevas Esperantan leteron kaj ne povas ĝin traduki.

SEATTLE, WASH.


Kun la Seattle-a grupo ĉe pikniko dum julio estis granda grupo el Tacoma, S-ro Arthur Ballard, el Auburn, kaj S-ro Bernard Ballard el Camarillo, California.

TORONTO, ONT., KANADO

En la Toronto-Klubo aperis nova-malnova speco de programo, la "viva gazeto". "Redaktoro" respondecas pri la tuta programo. Membroj parolas diversspecajn "artikolojn". Rekomendinda por ĉiuj grupoj.

WASHINGTON, D.C.

S-ano Chavez el Brazilo, hejmenirante post unujara restado en Francujo, vizitis dum iom da tempo en Washington. S-ro Chavez vizitis 11 landojn en Eŭropo, kaj trovis Esperanton ege utila.



"Panjo, kien iras la venusano?"

"Kompreneble al Madison, mia kara, por ĉeesti la Kongreson."

Konu Viajn Gesamideanojn

Ges-roj George Saville,
1035 N. Harper Ave.
Los Angeles 46., Cal.



GEORGE SAVILLE naskiĝis la 3an de majo, 1879, en San Francisco, sed loĝis en Pollando de la aĝo 3-jara ĝis 17-jara.

Li lernis la bakistan metion, poste dungiĝis ĉe la eldonejo, Simon & Schuster. Lernis Esperanton en 1921 en New York. La *Enciklopedio de Esperanto* enhavas bjl-don kaj artikolon pri li.

S-ro Saville tradukis en Esperanton multajn novelojn de O. Henry, Jack London kaj aliaj, kiuj tradukoj aperis en *Literatura Mondo* kaj *Sennacieca Revuo*. Lian tradukon de *The Iron Heel* (La Fera Kalkanumo) de Jack London eldonis SAT (1930); *Rigardu La Teron* (Van Loon's Geography, de H.W. Van Loon) eldonis Literatura Mondo (1936); *Judoj Sen Mono* (Jews Without Money, de Michael Gold) eldonis FLE en Nederlando (1940). Li ankoraŭ havas en manuskripto "The Story of Mankind", de Van Loon, "Arrowsmith" de Sinclair Lewis; kaj ĵus finitan tradukon de "Beaumarchais", de Georges Lemaitre.

S-INO SAVILLE tradukis kelkajn rakontojn de Hans Anderson. Dum multaj jaroj ŝi instruis Esperanton en diversaj lokoj en New York, i. a., SAT-rondo kaj Bahai-centro.

Por ke ni pli bone interkonatiĝu, la *Revuo* petas ke oni sendu materialon por pluaĵ artikoloj pri nordamerikaj gesamideanoj al Adrian Hughes (476 South Bailey Ave., Hillsboro, Oregon) kiu verkas la serion *Konu Viajn Gesamideanojn*.

NI BEDAŬRE ANONCAS

subitan morton je koratako, la 12an de majo, de

BERTHOID SCHMIDT.

Li naskiĝis la 1an de marto, 1874, en Bromberg, Germanujo, enmigris en Usonon kiam 22-jaraĝa, fariĝis advokato en 1904, ĉiam loĝis en Novjorko.

En siaj knabecaj jaroj pasintaj en Germanujo, li unue aŭdis pri Esperanto sed estis nur en 1924 ke li sciigis pri la novjorka Esperanto-movado, aniĝis, kaj jam de la komenco sindoneme kaj senlace laboris. Ĉefdelegito de UEA, 1925—1935. Komitatano de Amerika Esperanto-Akademio plurjare. Gvidis Harmonio-Klubon en Novjorko kelkjare. Honora Prezidanto de Harmonio-Klubo kaj New York Esperanto Society.

Dum lastaj jaroj, li laboris je kunigo de trilingva poemaro (Esperanto, angla, kaj la lingvo en kiu la poemo estis verkita originale).

Lia edzino, Louisa H. Schmidt (nee Hertweck), kiu Esperantistiĝis en 1933, esperas kunmeti la poemaron dum la venonta jaro kaj eldonigi ĝin je la memoro de sia edzo.


Introduction to Esperanto 3rd Edition

Sent on 10 days free examination

Price \$2.00

Box 792, Placerville, Calif.

Novaj Libroj



La Literaturoj de Ĉiuj Landoj Estas Viaj per Esperanto!

Kontralte, de Marjorie Boulton. Bonaj preso, papero. Paperbindo, 288 paĝoj. Eldonis Stafeto, kiu jam donis al ni tiel altvalorajn verkojn kiel *Kvaropo*, *El la Maniko*, ktp. La nivelo de la nuna verko estas neniel malpli alta. F-ino Boulton, Esperantistino nur de sep jaroj, certe havas talenton por poezio kaj por nia lingvo (ŝi estas sukcesa verkistino en sia naska – angla – lingvo), sed restas eble unu ŝtupon sub la genieco. Ŝajnas, ke ŝiaj sentokapabloj kaj vivperceptoj iomete antaŭkuras la lingvokablon aŭ imagon. Sekvo estas, ke la profundaj kaj delikataj pensoj estas ofte nur kun peno konstat-eblaj.

La verko estas frape virina; ne nur pro tio, ke ĝin plenigas preskaŭ entute lirikaj poemoj, sed pro la temoj pritraktitaj kaj la maniero ilin pritrakti. Konsideru la titolojn: “Inter Blindaj Infanoj”, “Nenaskotaj Infanoj”, “Doloro”, “Amdoloro”, “Subpremita Jaluzo”. Ĉi tiuj poemoj troviĝas en grupo portanta la titolon,

“Unu Virina Koro”, sed fakte la sama virina vidpunkto videbliĝas sur preskaŭ ĉiu paĝo. Eble ĝuste pro tio, ke la recenzanto ne estas virino, li ŝatas pli multe tiujn esceptojn, kie la aŭtorino demetas la bel- etran liron kaj ekprenas la pli popularajn instrumentojn, ludante sur ili pri ĉiutaga- aĵoj. “Rekviemo por Fuŝulo” estas, laŭ mi, elstare sukcesa poemo; same pri “Mal- frua Trajno en Januaro” kaj “Mi Lernas Ludi la Bekfluton”. Kvankam estas tute aliaj partoj de la libro, kiujn citos kaj laŭdos la altaj instancoj de la Esperanta literatura vivo (ekzemple: “Sonetoj el Virina Kolegio”), mi forte opinias, ke multe pli granda sekcio de la Esperantist- aro pleje ĝuos la pli terecajn pecojn, kiajn mi nomis supre.

Por fini menciindas, ke la lasta parto de la libro traktas la grandajn lumojn de la Esperanta vivo en jam familiara rim- portreto-formo.

DBR

IRU AL MADISON

VIZITU LA BIBLIOTEKON DE

Esperanto League Book Service



OR RIMISTOJ Kaj por ĉiuj, kiuj ŝatas infanojn. Eĉ poetoj legu ĉifoje!

Represita el *Bulteno Gepatra*. Dankon al Ges-roj R. Eichholz.

En la antaŭa numero ni prezentis versojn por gepatroj de infanetoj. Jen por iom pli aĝaj infanoj. La infanoj lernu Esperanton denaske!



1--3-jaraj

DUM VESTADO

Nia ĉevaleta,
ĝi ricevas ŝuojn.
Dekstre kaj maldekstre
levu ĉiun kruron!
Unu, du—tri, kvar, kvin—
ses kaj sep—ok, naŭ, dek.
Nun vi estas preta.

DUM LAVADO

Vizaĝon lavu, vizaĝon lavu—
purigu ĝin, purigu ĝin.
Manojn lavu, manojn lavu—
purigu ilin, purigu ilin.
Malpura akvo, malpura akvo,
malpura, malpura, malpurega!

IO DOLORAS

Ho doloro, ho doloro,
mia . . . doloras!
Nun ne plu, nun ne plu,
ĝi tute ne plu doloras!

Karesante la dolorantan parton (. . .),
diru la version, la du unuajn liniojn mal-
rapide, la lastajn en ĝojiganta ritmo.

Sendu al S-ano R. Eichholz, 133 Service
Road, Oakville, Ont., Kanado, rimojn, lu-
dojn, ktp., por infanoj.

Represo permesata se la fonto (*Bulteno Gepatra*) estas menciata.

1--4-jaraj

LA KVIN FINGROJ

Tiu la polekso estas,
tiu la pomarbon skuas,
tiu pomojn kolektadas,
tiu ilin hejmenportas,
fine tiu maldikulo
manĝas ĉiujn sola.

Tiu falis en akvon,
tiu eltiris lin,
tiu enlitigis lin,
tiu varme kovris lin,
fine tiu petolulo
. . . vekis lin.

Tie estas panjo—kara kaj bona,
tie estas patro—forta kaj saĝa,
tie estas frato—granda kaj diligenta,
tie estas franjo—brava, helpema,
tie estas nia . . . —ĝoje ludanta.
Kaj nun ili gaje dancas.

Tuŝu laŭvice la infanajn fingrojn, komen-
cante per la polekso. Dum la lasta linio,
dancigu viajn fingrojn sur la infanaj.



Complete Grammar, Alphabet and Pronunciation of Esperanto

THE ALPHABET

a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

The sounds of the vowels (a, e, i, o, u) are the vowel sounds in: "Are there three or two?" The consonant sounds are as in English, except: *c* as *ts* in *hats*, *ĉ* as *ch* in *church*, *g* as in *go*, *ĝ* as *g* in *gem*, *ĥ* as *ch* in *loch*, *j* as English *y*, *ĵ* as *z* in *azure*, *s* as in *so*, *ŝ* as English *sh*, *ŭ* as English *w*.

THE GRAMMAR

1. There is no indefinite article; there is only a definite article (*la*) alike for all sexes, cases and numbers.

2. Substantives end in *o*. To form the plural, *j* is added. There are only two cases: nominative and accusative; the latter is obtained from the nominative by adding *n*. Other cases are expressed by prepositions (genitive *de*, dative *al*, ablative *per*, etc.)

3. The adjective ends in *a*. Case and number as for substantives. The comparative is made by means of the word *pli*, the superlative by *plej*; with the comparative the conjunction *ol* is used.

4. The fundamental numerals (not declined) are: *unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, mil*. Tens and hundreds are formed by simple junction of the numerals. To mark the ordinal numerals, *a* is added; for the multiple, *obl*; for the fractional, *on*; for the collective, *op*; for the distributive, the preposition *po*. Substantive and adverbial numerals can also be used.

5. Personal pronouns: *mi, vi, li, ŝi, ĝi, si, ni, vi, ili, oni*; possessives are formed by adding *a*. Declension as for substantives.

6. The verb undergoes no change with regard to person or number. Forms of the verb: time *being* (present) takes the termination *-as*; time *been* (past) *-is*; time *about-to-be* (future) *-os*; conditional mood

-us; imperative mood *-u*; infinitive *-i*. Participles (with adjectival or adverbial sense): active present *-ant*; active past *-int*; active future *-ont*; passive present *-at*; passive past *-it*; passive future *-ot*. The passive is rendered by a corresponding form of the verb *esti* (to be) and a passive participle of the required verb; the preposition with the passive is *de*.

7. Adverbs end in *e*; comparison as for adjectives.

8. All prepositions govern the nominative.

9. Every word is pronounced as it is spelled.

10. The accent is always on the next-to-last syllable.

11. Compound words are formed by simple junction of the words (the chief word stands at the end). Grammatical terminations are also regarded as independent words.

12. When another negative word is present, the word *ne* is left out.

13. In order to show *direction toward*, words take the termination of the accusative.

14. Each preposition has a definite and constant meaning; but if the direct sense does not indicate which it should be, we use the preposition *je*, which has no meaning of its own. Instead of *je*, we may use the accusative without a preposition.

15. The so-called foreign words (that is, those which the majority of languages have taken from one source) undergo no change in Esperanto, beyond conforming to its orthography; but with various words from one root, it is better to use unchanged only the fundamental word and to form the rest from this in accordance with the rules of the Esperanto language.

16. The final vowel of the substantive and of the article may sometimes be omitted and replaced by an apostrophe.


Learn
Esperanto
now!



It's
the language
of the future

ESPERANTO-BY-MAIL, 123 East 35th Street, Brooklyn 3, N. Y.

JUST PLAIN



THIS MAGAZINE IS THE OFFICIAL ORGAN
OF THE

Esperanto League
for North America, Inc.

If You Like The Review, You'll Like The League.

Why not Join Us Now?

Regular Member.....	\$ 3.00
Man and Wife.....	4.00
Supporting Member.....	5.00
Patron.....	10.00
Life Member.....	50.00

Membership includes subscription to the Review. All contributions to the League are tax-deductible. Review subscription alone, \$1.75.

Mail application and payment to:

Esperanto League for North America, Inc., Somerton 16, Pa.